

Rezultoj ene de tridek tagoj

Tio sugestas ke ni eniras reklamon por har-rekreskigilo aŭ fum-ĉesiga programo. Sed ne. Temas pri resumo de la unua monato de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) depost la estrar-elektoj en Krakovo, Pollando. La atingoj estas modestaj, ĉefe internaj, kaj plejparte retrorigardaj. Tamen, indas katalogi ilin kun la intenco en la sekvaj 30 tagoj turni la atenton pli eksteren kaj al la estonto. Sube la tem-aludoj rilatas al nia hejmpaĝo <www.ilei.info> kiun nepre indas viziti.

Plenumitaj taskoj:

- Estrara task-divido decidita kaj celaro 2009-2012 aprobita kaj afiŝita (ĉe Novaĵoj).
- Nova komisiono starigita por universitata agado, aliaj renovigitaj/ataj.
- Raportoj komisionaj (ekzamena kaj terminologia) afiŝitaj (ĉe 'Novaĵoj')
- Indika buĝeto por 2010 akceptita kaj afiŝita (hejmpaĝe ĉe 'Dokumentoj')
- Unua komuniko pri la sekva konferenco diskonigita, prepardokumentoj hereditaj.
- Enhavo de IPR 2009/3 pretigita kaj survoje al finredakto.
- Raportoj pri la krakova konferenco kaj simpozio afiŝitaj (ĉe 'Novaĵoj')
- Alvoko por la instruisto-trejna kurso de UAM (Poznan) dissendita kaj afiŝita ('Novaĵoj')



Laboroj en progreso:

- Pretigo de ĝenerala laŭmonata taskaro por ILEI, kun specifa taskaro ĝis aŭgusto 2010.
- Kompilo de la 18 ricevitaj sekciaj raportoj 2008 en unu dosieron, por afiŝigo.
- Kompletigo de la komitato de ILEI (ĉ. 12 nenomitaj lokoj), cele al regulaj retaj voĉdonoj. (ankoraŭ lanĉendaj)
- Enhavo de Juna amiko 2009/2 progresanta sed finenda.

Taskoj por la sekvaj 30 tagoj:

- Difino de la preciza konferenca oferto kaj aperigo de aliĝilo, plurilatante kun UEA pri flugofertoj.
- Estraranoj pretigos siajn kontribuojn por la trijara plano akceptota novembre. (ne okazis)
- Komisionoj estos petataj difini siajn celojn kaj projektojn, laubezone nomi gvidanton, aktualigi sian membraron kaj arigi kunlaborantojn.
- Pretigoj por partopreno de ILEI en la kvina TORPEDO, la pedagogia renkontiĝo de la germana sekcio (nia plej granda) frue en oktobro.
- Pretigoj por la elpaŝoj de ILEI en la malferma tago de la Centra Oficejo de UEA, kiu koincidos kun la estrar-kunsido de ILEI en Hago (fariĝis Roterdamo), fine de novembro, 2009.



Indas ne fumi, ami vian hararon kiel ĝi nun aspektas, sed super ĉio ligi vin al ĉi tiuj laboroj!

Verde = aktualigaj komentoj je Feb 20, 2010. SMG